# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby

PLENUMITA 29/08/2024 sepcentdua eldono (unua eldono 26/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .



**Pasintaj „Aŭstraliaj Esprantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estos sendataj al AEA. (Sen #)

# Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan ĉirkau -5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon
Ne estas facile elekti el la ĉiuj tagprogramoj Do aŭskultu ĉiujn.

Muŝoj konvertas rubaĵon al krudmaterialoj 24/08/2024

## AEA estrarkunveno 2024-08-22

Ĉeestis: Heather Heldzingen, Joanne Johns, Jonathan Cooper, Terry Manley, Sandor Horvath, Paul Desailly, Bradley McDonald, Caroline Turner

**(1)UK en Aruŝo**

Heather raportis pri sia sperto dum la lasta UK en Aruŝo. Nepre legu
ŝian artikolon en la venonta eldono de ESK.

**2) Somerkursaro 2025**

Familio de kvin homoj intencas alliĝi..... Bone
Heather ankaŭ indikis ke kelkaj "vere" montris intereson dum la Movada Foiro en Aruŝo.
Jen la ideoj ....
KIEL ALLOGI PARTOPRENANTOJN?
Jen la ideoj de niaj lasta kunveno ... Ni "kontrolu":
- proponi nin al radio stacioj kiel gastparolanto
- U3A proponi nin.... maljunuloj havas genepojn
- Disdono de niaj "vizitkartoj" en iu ajn loko
- Telefoni membrojn kaj nemembrojn kaj ankaŭ demandi ilin kiel ni allogu partoprenantojn
- Dum ĉiu kunveno ni raportu... kion ni faris dum la lastaj du semajnoj por allogi partoprenantojn
- Granda elsendo al lernejoj/universitatoj... eble eĉ stipendio(?)
- Kontakti instruistojn, kiujn ni persone konas
- Certigu ke esperantistoj en aliaj ŝtatoj sciu pri la somerkursaro ..... kaj
- Regulaj retmesaĝoj al niaj membroj pri la preparado
HELPU KUN LA VARBADO!!!

**(2) Tara Kemp**

Ĉu ni subteni ŝin ? - Propono de Peter Danzer.
Caroline renkontos ŝin dimanĉe kaj esploros.

**(3) Nia retejo (Jonathan) - Malgranda propono**

Saluton kolegoj,
Mi havas malgrandan diskutpunkton por la kunveno ĉi-ĵaŭde:

Ankaŭ kelkaj jaroj ni ricevis ofterton peti novajn retejo-domajnnomojn. Ni sukcesis ricevi 'esperanto.au', tamen alian, 'eo.au', alia organizaĵo ankaŭ petis: Embrace Orthodontists, Canberra. (Ilia nuna domajnnomo estas 'eo.com.au'.)

Mia ideo *ne* estis ŝanĝi la adreson de nia retejo al 'eo.au', tamen uzi ĝin por etaj ligiloj en presitaj publikaĵoj, kiel ni nun faras per 'bit.ly'. (Do, ekzemple, en ESK 2022-03, estas ligilo, bit.ly/poligramo-5x5, kiu alidirektas al https://puzzlefoundry.com/PgramDo?pgid=1046&usr=donaldo. Mia ideo estis, ke ni povus anstataŭe skribi 'eo.au/poligramo-5x5', kiu aspektus iom pli... "Esperanta"!)

Post tiam, ni pagis malgrandan sumon (~ $25) ĉiujare por daŭri la "konkurson" por 'eo.au'.

La demando estas, ĉu ni daŭre pagi tiun sumon? Mi antaŭnelonge ricevis retleteron de nia domajn-registrejo, ke nia peto por 'eo.au' nuligos la 20an de septembro se ni ne renovigus ĝin.

Mi ne scias ĉu Embrace Orthodontists facile aŭ eĉ *iam ajn* forlasos sian penon, sed mi dubas.

Parenteze, mi ĵus kontrolis: la domajnnomo 'espo.au' estas havebla (la unuaj 3 jaroj kostus $29.90). Ĉu indas?

Amike, *Jonathan Cooper*

Ni decidis ja pagi la $25...por eble ricevi la domajnnomon "eo.au"

Jonathan kontanktos "Embrace Orthodontist en Kanbero"

**(4) Esperanto Domo en Melburno** La serĉado daŭras

**(5) ESK** Baldaŭ aperos.

# Interesaj faktoj por Propagando

## .Lernado de fremda lingvo postulas

| Lernado de fremda lingvo postulas | Komparu Esperanton |
|---|---|
| *Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...* | ..Fonetike senescepta |
| *Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj..............* | ..17senesceptaj reguloj |
| *Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo.........................................* | ..Kunmetitaj vortoj |
| *Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..* | ..Unu prononco |
| *Lernu la lokan parolatan lingvon.......................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon...............................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la idiomojn de la lingvo .........................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj............* | ..Unu monda lingvo |

## Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

La plej multaj Esperantistoj lernis Esperanton kiam ili estas plenkreskaj

Do ili estas tre toleremaj kaj helpemaj al lernantoj. *Roger Springer*

⭕ Aŭstralio prenos komandon de la mara specialtrupo en Ruĝa Maro kaj Adena Golfo de oktobro dum 6 monatoj

"Ĉiu pafilo kiu estas farita, ĉiu batalŝipo lanĉita, ĉiu raketo pafita signifas, en la fina senco, ŝtelon de tiuj kiuj malsatas kaj ne estas nutrataj, tiuj kiuj estas malvarmaj kaj ne estas vestitaj. Ĉi tiu mondo en armiloj ne elspezas monon sole. Ĝi elspezas la ŝviton de siaj laboristoj, la genion de siaj sciencistoj, la esperon de siaj infanoj." - *Eisenhower*